

STARTO

N-ro 4/2007 (225)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**ĈeĤa Esperanto-Asocio
konferencis en Poliĉka
22-a / 24-a de septembro 2007**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

rete Starto: malovec@volny.cz,

rete ĈEA:

cea.polnický@quick.cz (sekretario)
melicharkova@quick.cz (prezidanto)
www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentace ĈES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříčovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, vydavatelská činnost, EU, retkomunikoj)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz (členská základna, účetnictví)

Komitatano: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradská@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

Komitatano: Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz, (sekce, komise)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

Kontrolgrupo de ĈEA: Prezidanto: Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., stepanova.v@kr-ustecky.cz; Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz.

Kontrollegis: la komitato

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

Konferenco de ĈEA

Ĉeĥa Esperanto-Asocio konferencis (22.-24.9.2007) en Polička en la loka teatro portanta la nomon de J. K. Tyl. Venis 101 geesperantistoj. Vendrede vespere franca gastulo Hannes Larsson rakontis laŭ lumobildoj, kiel li ellernis Esperanton dum du jaroj en sia emerita aĝo, poste Petr Chrdle klarigis siajn spertojn pri profesia uzo de Esperanto (en vojaĝagentejo kaj eldonejo), sed ĉefe li prezentis siajn travivaĵojn el Jokohamo en la ĉijara UK, kiu por li kulminis per ekskurso al la monto Fuji.

Zdražil per rakontado pri la historio de la urbo. Infanoj-esperantistoj el la proksima Česká Třebová prezentis kelkajn scenetojn, kantojn kaj dancojn. Poste la asocia prezidantino Jana Melichárková raportis pri la agado de la asocio dum la pasinta jaro. Petr Chrdle informis pri la internaciaj rilatoj de ĈEA (UEA, SKEF, GEA) kaj proponis ĈEA-retkomunikojn al retanoj. Vratislav Hirš klarigis la ekonomian situacion kaj membrobazon de la asocio.

En diskutoj Miloslav Šváček informis pri IKUE, Dagmar Chváta-



La sabatan laborprogramon inaŭguris la urbestro Jaroslav Martinů per saluto kaj la muzeestro Martin

lová pri Ĉeĥa Esperanto-Junularo, Miroslav Malovec pri Starto kaj EK Brno, Miroslava Tomečková pri



ebleco vojaĝi venontjare al UK Rotterdam, Pavel Polnický pri KELI kaj abonado de gazetoj kaj Anna Vyšinková pri la asocia Libroservo kaj pri la kompletigita listo de la asocia biblioteko.

Posttagmeze, post trarigardo de la urbeto kun konservitaj mezepokaj muregoj kaj preĝeja turo, en kiu naskiĝis la komponisto B. Martinů, oni daŭrigis la programon en la Tyl-domo en pluraj ĉambroj samtempe: konkurso Risku!, prezentado de la

asociaj sekcioj, legado de dramo por du personoj kaj diskuto pri la strategio de Esperanto. La sabata vespero apartenis al dancamuzo kun riĉa tombolo.

La dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al la projektoj Wikipedia kaj Wikimedia, per lumbildoj estis klarigite kiel oni enmetas tekstojn kaj fotojn. Poste la konferenco estis fermita.

Miroslav Malovec

Raporto pri kluboj

En Ĉeĥa Esperanto-Asocio estas registritaj 38 kluboj, kiuj organizas multajn aranĝojn.

Brno - regulaj kunvenoj kun prelegoj, junulara seminario „Lingvoj en Interreto“, esperantigo de la prospekto „Brno - ĝusta direkto“, kiu aperos en la retejo de la magistrato, iniciato ELFO kaj helpo kun preparo de la tendaro en Lančov.

Česká Třebová - Esperanta Silvestro, laboro kun infanoj (Zdenka Novotná), Esperanto-muzeo.

Karlovy Vary - EKOTUR 2007 organizata de KAVA-PECH.

Litomyšl - renkontiĝo kun prelego pri Svedio

Mladá Boleslav – Mnichovo Hradiště - organizado de du seminarioj en Skokovy kunlabore kun AEH, eldonado de legolibretoj kaj tradukoj el Esperanto.

Olomouc - programoj en loka radio, renovigo de la kluba retejo.

Opava - kunlaboro kun Esperanto-muzeo en Česká Třebová, helpo al studentino prilabori bakalaŭran laboraĵon „Esperanto en Opava 1945-1965“.

Pardubice - Esperanto-tago, plie en la urbo havas sidejon AEH, kiu eldonas regule Informilon kaj organizis kongreson en Seč, kiun surprizis televido.

Písek - Sabla Printempo kun seminario pri Vikipedio kaj tradukado de turismaj broŝuroj, poste kontribuoj al Vikipedio, renkonto de familioj en Pílský mlýn, postferia renkonto en Strakonice.

Plzeň - renkontiĝo en Plasy, jam tradicia.

Polička - preparo de la konferenco kunlabore kun Svitavy, Litomyšl, Česká Třebová.

Poruba – kun la lernantoj de la gimnazio „Olga Havlová“ la esperantistoj zorgas pri Esperanto-arbo, preparis renkonton sur Čantoryja, J. Suchánek en televida programo Sabotáž

Praha – en la poeziaj vesperoj aŭdeblis esperantlingve versoj de Věra Ludíková kaj Čestmír Vidman, deziron deklami en Esperanto esprimis prof. R. Lukavský; aperis memorlibro de Č. Vidman kun multaj aludoj pri Esperanto; en la proksima Dobřichovice realiĝis Internacia Paroliga Semajno kun internaciaj ekzamenoj kaj KAEST de firmao KAVA-PECH, kiu ankaŭ organizis karavanon al UK Jokohamo kaj eldonis novan libron *Jim, la migrulo*. Aperis *Kosmo sonoras per steloj* de Z. Bergrová en traduko de J. Krolupper; junularo preparis kluban prezentiĝon en la interreto, regule aperas Bulteno

Prostějov – aranĝis ekspozicion, prelegis en mezlernejoj pri Esperanto, kunlaboras kun skolta grupo, kiu apartenas al la klubo.

Přerov – bona kunlaboro kun lokaj oficejoj por propagandi la urbon, apero de klubanoj en televida elsendado.

Ratíškovice – jam tradicia Adonido, infana Esperanto-rondeto, kurso po plenkreskuloj, en Vracov ĉe la geedzoj Vyšinka troviĝas la asocia biblioteko kaj Libroservo.

Svitavy – laboro kun infanoj, Infana Esperanto-tago, ĉefaj organizantoj de la konferenco en Polička, presado kaj dissendado de Starto.

Šumperk - printempa renkonto pri Eskymo Welzl.

Teplíce - kunlaboras kun lokaj gimnazianoj, esperantigo de la gimnazia retejo, esperantigo de versoj de lokaj poetoj.

Třebíč – organizado de la tendaro en Lančov, d-ino Bártlová gvidas infanan rondeton en Okříšky, esperantigis la retejon en Okříšky, prelegis por geknaboj en la loka biblioteko, estis intervjuata de gazetaro

Ústí nad Labem - centjariĝo de J. Kořínek kaj T. Pumpr estis omaĝita per 18-a festivalo kun koncertoj kaj prelegoj;

Znojmo - festis sian kluban jubileon, pri kiu aperis riporto en loka ĵurnalo

La asocia biblioteko

La asocia biblioteko, troviĝanta nun en Vracov ĉe familio Vyšinka, enhavas 2616 titolojn, kies listo estas komputile prilaborita kaj aperos en la interreto. Bedaŭrinde sole la eldonejo KAVA-PECH sentas moralan devon sendi al la asocia biblioteko siajn eldonaĵojn, la ceteraj eldonantoj tion ne faras, tial ni ne havas ĉiujn novaĵojn aperintajn en Ĉeĥio en lastaj jaroj. Unu el siaj tradukoj sendis ankaŭ J. Krolupper kaj plurajn malnovajn librojn proponis J. Werner. Al ĉiuj donacontoj ni dankas. Ĉe la biblioteko funkcias ankaŭ la asocia libroservo.

Anna Vyšinková

Laxness en Esperanto

Sendependaj homoj, romano de la islanda Nobel-premiito Halldór Laxness (1902-1998) aperis nun en Esperanto.

Diskuto pri strategio

Kelkaj artikoloj en la pasinta Starto vekis reagon de pluraj personoj. Psikologo Josef Šindelář opinias, ke necesas porti insignojn, ornami siajn dompordojn aŭ vendejojn, kie oni parolas Esperanton, pli intense uzi simbolojn, ĉar la historion ne regas raciaj motivoj. Jan Werner kaj Jan Kalný opinias, ke necesas forlasi amatorecon kaj diletantismon, malrapide, sed profesinivele realigi realismajn celojn, J. Kalný rekomendas koncentriĝi al religiaj kaj kulturaj organizoj kaj subevoluintaj landoj. Jarmila Rýznarová sondis en librovendejoj kaj konstatis, ke la vendistoj opinias, ke Esperanto ne plu ekzistas; pluraj esperantistoj havigis al si komputilon, sed ne scias, kiamaniere ili povus uzi ĝin por la esperantista laboro. Entreprenisto Pavel Lehký estas konvinkita, ke necesas Esperanton sukcesigi tra ekonomio; kiam entreprenistoj devas prizorgi instrukciojn por siaj varoj en ĉiuj 25 eŭropuniaj lingvoj, ili devas elspezi milionojn, kiujn ili prefere utiligus alimaniere; Esperanto estas avantaĝa precipe por ordinaraj homoj, el kiuj apenaŭ 10% scias lerni la anglan, kvankam ili klopodas pri tio; la publiko devas elpostuli Esperanton de la politikistoj.

Miroslav Malovec

Preparataj libroj

En 2008 aperos ĉe diversaj eldonejoj gravaj verkoj: *La dormanto vekigás* de H. G. Wells, *Origino de Specioj* de Ch. Darwin, *La grafo de Montekristo* de A. Dumas, *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* de J. Verne.

Světový kongres

ROTTERDAM

19. - 26. červenec 2008

V roce 2008 se koná v Rotterdamu, sídle UEA, celosvětový kongres esperantistů. Rotterdam není vybrán náhodou. Rok 2008 je rokem, kdy UEA oslaví 100 let od svého založení.

Cestovní kancelář Ciao ze Strakonice, pořadatel zájezdu na UK do Florencie v roce 2006, nabízí možnost zúčastnit se autobusového zájezdu na kongres s ubytováním v hotelu se snídaní. Hotel se nachází v blízkosti místa konání kongresu.

Doprava je zajištěna klimatizovaným autobusem, který bude k dispozici po celou dobu zájezdu a cena zahrnuje i výlety. Nejvýznamnější místa země navštívíme ve spolupráci s místním specialistou (Dutchmasters).

Cena zájezdu je 14.000 Kč a zahrnuje:

- dopravu z ČR luxusním busem (klíma, WC, palubní minibar)
- 7x ubytování se snídaní
- doprovodný program s výlety ve spolupráci s Holandskou centrálou cestovního ruchu
- doprovodné informační materiály k cestě a pobytu
- pojištění organizátora zájezdu podle Zák. 159/1999 Sb.
- pojištění pro cesty a pobyt v zahraničí včetně pojištění storna zájezdu

Cena nezahrnuje kongresový poplatek. Účastníci, kteří chtějí navštívit akce kongresu, si musí uhradit poplatek individuálně.

Zájemci o autobusový zájezd do Rotterdamu v roce 2008, hlase se prosím u
Mirky Tomečkové, Dr.Bureše 3, 370 05 České Budějovice;
607 624 926, mirka.tomeckova@seznam.cz

Biblioteka kolokvo en Vieno

"La defio de la novaj teknologioj por la planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj" estis la ĉeftemo de la kolokvo en la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno, 19/20-an de oktobro 2007. Pri la problemoj kaj praktikaj spertoj de planlingvaj arkivoj prelegis Detlev Blanke, pri la tradiciaj bibliotekoj Herbert Mayer. La skanadon de fotoj en Vieno prezentis Christian Cimpa, la bibliotekon en Aalen priskribis Utho Maier kaj Karl Heinz Schaeffer. Miroslav Malovec parolis pri la E-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj pri disponigo de libroj per elektronikigo, Reinhard Hauptenthal pri Volapuko en arkivoj kaj bibliotekoj („lingva arkeologio“). Arpad Mathe montris preparatan katalogon de periodaĵoj en bibliotekoj kaj libraroj, Barbara Pietrzak rakontis pri savado de la Esperanto-sonarkivoj de Pola Radio. Toon Witkam gvidis tra la problemoj de provlegado post skanado de tekstoj. Marek Blahuš vekis grandan intereson per sia prezento de la interreta superkatalogo kaj cifereca arkivo de Esperanto-literaturo. Ljubomir Trifončovski klarigis problemojn de la klubaj bibliotekoj per ekzemploj el Bulgario kaj kiel la Komuna Integrita Biblioteka Sistema de Esperantio (KIBS) povus helpi al la lokaj grupoj konservi sian libro- kaj arkiv-heredaĵon. H. Mayer reagis, ke la klubaj bibliotekoj ĉefe eduku legantojn, sed arkivaĵojn konfidu al profesiaj bibliotekoj.

Prelegojn sekvis trarigardo de la muzeo.

La tekstoj de la prelegoj aperos libroforme en 2008 sub la redakto de Detlev Blanke kaj Herbert Mayer.

Interlingvistika konferenco

en Berlino okazinta unu monaton post la Viena kolokvo parte daŭrigis ĝian laboron. Antaŭ lingvistoj (ankaŭ ekstermovadaj) Marek Blahuš ripetis germanlingve sian vianan prelegon pri superkatalogo de Esperanto-libroj sub la junulara projekto Bretaro kaj membriĝis ĉe GIL (Gesellschaft für Interlinguistik = Societo por interlingvistiko). Kun Detlev Blanke li poste pridiskutis aliajn projektojn de junularo kiel „lernu ankoraŭ unu lingvon, reta universitato. Vikipedio“ k.s.

Berlina Expolingua

En la tritaga foiro pri lingvoj estis ĉijare kiel gastlingvo elektita la rusa, sed oni prelegis pri multaj aliaj inkluzive de Esperanto. Bedaŭrinde en la foirlibro la prelego estas malbone prezentita kaj venis nur dek aŭskultantoj. La Esperanto-stando havis titolon *Esperantoland*, je kio la preterpasantoj reagis moke. Ankaŭ filmeto en komputilo pri Esperanto ne vekis intereson, nur la Danĝera Lingvo elvokis miron, ke lingvo povas esti danĝera.

La standanoj aktive ofertadis al preterpasantoj flugfoliojn. Al junaj homoj plaĉis precipe Pasporta Servo, „lingvo kiel ludo“ kaj kompaktaĵoj. Duono el ili neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto, sed neniu reagis malamike (eble la negative pensantaj homoj rapide preterpasis). La informantoj evitadis la vorton „artefarita“ kaj pri Zamenhof ili ne parolis kiel pri kuracisto, sed kiel pri konanto de multaj lingvoj.

laŭ J. Mayer kaj Ch. Smith

Sonregistraĵoj de gravuloj

Rememora retejo pri Verda Stacio apud informoj pri la iamaj radio-elsendoj prezentas konservitajn sonregistraĵojn de niaj gravuloj, kvankam tiuj surbendigoj estiĝis ekde 1960-aj jaroj. Oni povas ilin elŭti en sian komputilon kiel podkastojn. Do almenaŭ tiamaniere ni povas iomete revivigi la gloran epokon. De tie oni trovas ligojn ankaŭ al rememoroj pri niaj teatroj, tendaroj, faka agado k.s.

http://www.medy.cz/Brno-Esperanto/Verda_stacio/Verda.htm

-mm-

Turistoj povas viziti Strasburgon Esperante

500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la Strasburga Sendependa haveno ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, ni proponis al la haveno traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo al Esperanto.

La estro de la haveno akceptis la proponon. Post adaptiĝo al la internacia publiko kaj traduko, helpitaj de Catherine Roux kaj Ginette Martin, la strasburgaj klubanoj surbendigis la tekston.

Nuntempe, Esperanto aŭskulteblas ĉe tegmentaj boatoj, venontjare la sentegmentaj boatoj ricevos ĝin post adaptiĝo de sia sonsistemo.

Esperanto nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito. Antaŭ ĉiu ekiro, la ŝipestro anoncas ĉiujn dek lingvojn per laŭparolilo, do ankaŭ "Por aŭskulti la ĉiĉeronadon per la internacia lingvo Esperanto, elektu numeron 10".

Cyrille Hurstel

Doktoriĝo pri Esperanto

Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de "Esperanto Nederland" kaj de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en tiu sama universitato. La 283-paĝa disertaĵo estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, Esperanta kaj germana lingvoj.

laŭ Ret-Info

Lernejoj aliĝu!

Ĝis la 29-a de februaro 2008 oni povas kandidatiĝi al la programo "Dumviva Lernado" de Eŭropa Unio, versio Comenius. Oni celas starigi grupojn de tri/kvar lernejoj el malsamaj landoj, kaj kun apogo de Eŭropa Unio veturigi lernantojn inter la lernejoj de ĉiu grupo.

Plulegu kaj pli informiĝu ĉe <http://lingvo.org/akel/> la oficiala retejo de la projekto enkadre de Eŭropa Esperanto-Unio.

Luis Ladeira (Luizo Ladejra)

Malĉeesta konferenco

Uljanovska pedagogia universitato anoncis malĉeestan sciencon konferencon laŭ temo: "Aktualaj problemoj de klerigado en Rusio kaj eksterlande: lingvistika, metodika, pedagogia aspektoj". Unu el 5 laboraj lingvoj estas Esperanto. Pliaj detaloj (ruslingve) troveblas en http://reu.ru/enhavo/konferenco_uljanovsk_2008.doc. Limdato: la 1-a de marto 2008. Prezo: 100 rub. por paĝo (+ 50 rub. sendokosto). *Yurij Karcev*

Esperantistojn interesis produktado de reklamoj

Sabate la 8-an de septembro 2007 la Esperanto-rondeto en Litomyšl organizis renkonton. Kvankam la vetero malfavoris, alveturis 25 partoprenantoj el Praha, Dobřichovice, Šumperk, Žamberk, Česká Třebová, Rudoltice, Polička, Svitavy, Sebranice kaj Lezník. Antaŭtagmeze la loka espereantisto s-ro Josef Flídr ven-

Britio, Francio, Germanio aŭ Ukrainio).

La posttagmeza programo pasis en la restoracio „U Párů“. Rerezentantoj de unuopaj kluboj kaj rondetoj raportis pri sia agado. S-ro Kovář dividis sin pri siaj travivaĵoj el vojaĝo tra Danlando, Norvegio kaj Svedio. Prezentis sin ankaŭ la etaj esperantistoj de instruistino Zdenka Novotná el Česká Třebová. Jitka Rybková kantis novan Esperantan kanton, kiun ŝi lernis dum sia restado en Francio. La



igis ilin al uzino de kompanio *STORY design Litomyšl* en la strato Moravská, kie atendis ilin la produktadestro s-ro Ptáček. La kompanio produktas reklamojn kaj internajn por bankofilioj, por preskaŭ ĉiuj bierfarejoj enlandaj, por vendejoj de poŝtelefonoj kaj tabakaĵoj. Siajn produktojn ĝi eksportas al la okcidenta kaj orienta Eŭropo (ekz. Granda

eta Honzík Bauer kantis akompanante sin mem per gitaro. Plej multe katenis la atenton Petr Chrdle per sia rakontado pri UK en Jokohamo, pri la nokta marŝo sur la monton Fuĵi kaj pri renkonto kun la japana tradukisto el la ĉeĥa, Kurisu Kei, kiu eĉ kiel naŭdeksepjarulo estas vigla kaj plena de planoj.

Libuše Dvořáková

Afriko ĉarmis esperantistojn

Sabate la 6-an de oktobro 2007 la Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy aranĝis renkonton, al kiu alveturis 25 partoprenantoj el la tuta respubliko (Brno, Pardubice, Pĕrovo, Ŝumperk, Ŝamberk, Ĉeská Třebová, Litomyšl,

bestojn, kiuj kuraĝas veni inter la homajn loĝejojn kaj mortigadi. Tiel li estis invitita pafi elefanton, bubalon, leonon kaj rinoceron. La bestoj estas tre sagacaj kaj la ĉasisto devas esti tre atentema, por ne fariĝi ilia plua viktimo. La rakontado kun fotoj estis streĉa kaj interesa.



Polička, Lezník). Inter la partoprenantoj estis ankaŭ s-ino Rosa Werner el la germana Salgast.

Speciala buso transportis la partoprenantojn al Banín, kie esperantistoj jam duan fojon vizitis ekspozicion de trofeoj de s-ro Miroslav Ducháček. S-ro Ducháček estis en Afriko jam 53x. Krom la Sudafrika respubliko li vizitas plej ofte Tanzanion. La lokaj loĝantoj lin ofte invitas pafi danĝerajn

La posttagmeza programo okazis en la Pedagogia-psikologia konsultejo de Svitavy. Kvido Janík el Ŝumperk rakontis pri siaj vojaĝoj sur la greka insulo Kreto kaj per vido montris ĝiajn belaĵojn. Li ĉiam zorge preparas sin por vojaĝado kaj studas historion kaj memoraĵojn de la lando. Li rimarkas eĉ aferojn, kiujn ordinara vizitanto preteratentus.

Libuše Dvořáková

Promeno en praepokon Přerov – Předmostí

Trideko da partoprenintoj el diversaj Esperanto-kluboj vizitis (la 13-an de oktobro 2007) trovejon de mamuto-ĉasintoj en Přerov – Předmostí. La promenon preparis lokaj esperantistoj.

La promeno komenciĝis ĉe mamuto TOM. Ĉeestintoj unue por varmigo gustumis mamut-likvoron kaj ekpaŝis al historia setlejo, kiu jam fariĝis monde konata fine de la 19-a jarcento danke al trovo de restadejo de mamuto-ĉasantoj el la tempo antaŭ 27 – 26 000 jaroj apud la loko nomata Skalka. Aliaj trovoj pruvas pluan loĝatigadon ĝis la tempo de la unua skriba mencio, kiu devenas el la jaro 1362.

Survoje estis instalitaj informtabuloj, kiuj priskribas estintan vivon en tiu ĉi

regiono, kie tiam mamutoj kaj homoj vivis apud si kaj kiam la homo mamutojn evidente ĉasis.

Krom la historia parto oni povis ankaŭ trarigardi belan pejzaĝon, vidi panoramon de urbo Přerov kaj ankaŭ fame konatan motoristan Přerovan ravinon.

La vetero estis oportuna, kvankam matene pluvis, sed laŭ „orakolo“, kiun proklamis prezidanto de EK Přerov, komence de marŝado la suno ekbrilis, nuboj fuĝis, kaj tio plialtiĝis impresojn de la aranĝo.

Post fino de kelkkilometra irado ĉiuj kolektiĝis en restoracio „Ĉe mamuto“, dum tagmanĝo oni taksis la ekskurson, babilis kaj ĝuis bonan etoson en amika rondo.

Kun danko al organizantoj de interesa renkontiĝo ĉiuj kontente foriris hejmen.

Věra Podhradská



Lige al UK en Jokohamo

(daŭrigo)

Kiel mi promesis en la pasinta numero de Starto, mi volas ankoraŭfoje reveni al la flugkaravano en Japanion lige al la Universala Kongreso en Jokohamo, nome iom rememori pliajn partojn de la turisma parto. Certe meritis ampleksan priskribon la Jokohamo mem, la dua plej granda urbego de Japanio, la miksaĵo de la plej moderna arkitekturo frunte de la plej alta konstruaĵo de Japanio Landmark Turo ĉirkaŭ-



ita de moderna urboparto Minato Minai kun la kongresa centro, en kiu okazis la ĉijara Universala Kongreso. Sed ĉiukaze ankaŭ pli profunde menciis ĉiujn kvar ĉefurbojn tra la historio de la unuiĝinta

Japanio (Nara, Kĵoto, Kamakura, Tokio). Ĉiujn-ĉi ni vizitis kaj admiris la neimageblan nombron de historiaj vidindaĵoj, ĉefe sed ne nur ŝintoismajn sanktejojn, budhismajn templojn kaj neimageble belegajn ĝardenojn.

Tamen, mi limigu min al du eventoj, kiuj plej forte impresis min, nome la viziton de Hiroŝima kaj la suprengrimpon al la pinto de la sankta monto Fuĵi.

Tuj post la atingo de nia hotelo en Kĵoto komence de nia esplorado de Japanio atendis nin tie paketo, donaco de miaj multjaraj amikoj, geedzoj Moritaka kaj Taeko Osioka el Hiroŝimo: ĉiu el ni ricevis belaspektan broŝuron pri Hiroŝima, celo de unu el niaj ekskursoj. Danke al ĝi ni povis jam anticipe konatiĝi kun la urbo, kiu en la tuta mondo signifas sinonimon por „nuklea teruro“ kaj „paco“.

Certe ĉiu el la legantoj, legante la nomon Hiroŝimo, tuj pensas pri la nekompreneble kruela ago kontraŭ loĝantoj de tiu urbo fine de la dua mondmilito. Ja ne eblis ne viziti ĝin kaj ne rigardi, kiel nun vivas la urbo, antaŭ 62 jaroj komplete detruita de ununura bombo kaj ne rememori la senkulpajn viktimojn. Tion ĉion ni volis vidi kaj tion ni atendis. Tamen, starante en la loko de la



Nia grupo en Hiroŝimo

tragedio, rigardante en la muzeo al la planoj kaj modeloj de la centro de Hiroŝimo post la eksplodo de la atombombo kaj al la postrestintaj aĵoj de la tiam mortintaj, aŭ longajn jarojn poste ankoraŭ mortantaj personoj inkluzive infanojn, promenantante tra la Parko de Paco en la loko de la epicentro kaj rigardante la "kupoldomon", eksan industri-foiran domon (paranteze: ĝin konstruis la ĉeĥa arĥitekto Jan Letzel), kiu ununura de ĉiuj domoj en la epicentro restis staranta (kvankam forte damaĝita), oni kortuŝitaj vere perdas spiron pro konsterniĝo kaj devas silente demandi sin "kial?".

Ne nur Japanoj, kiuj vere modele prizorgas la lokon de la pietato, sed neniu sur nia Terglobo rajtas forgesi! En Hiroŝimo pli ol ie ajn oni ekkomprenas, ke paroli pri neceso prizorgi Pacon ne estas nur griza frazo, sed vere la plej grava afero kaj reala neceso en ĉi tiu Terglobo. Estas tre bedaŭrinde, ke la plej potencaj ŝtatestroj ofte forgesadas tion!

En la urbo mem troviĝas ĉirkaŭ 200 monumentoj dediĉitaj al la atombombitoj, el inter ili la plej impresiga estas sendube la Monumento por Atombombitaj Infanoj. En la jaro 1956 "Societo de Gekna-

boj kaj Gelernantoj por Konstrui Pacon" komencis kolekti poŝmonojn de infanoj volante konstrui monumenton rememore al knabino Sasaki Sadako, kiu travivis la eksplodon kiel dujara, sed kiel dekdujara mortis pro leŭkemio. Kaj jam la 5-an de majo 1958 oni inaŭguris la monumenton. En la monumento eblas legi: "Ne plu milito! Eternan pacon!" Tiun revon certe ĉiu sentas en Hiroŝimo pli intense ol ie ajn en la mondo. Ni nur deziru, ke tiu slogano efektive plenumiĝu!

Mi ankoraŭ aldonu, ke survoje al Hiroŝimo ni vizitis la insulon Mijaĝima, pli konatan laŭ la sanktejo Icukuŝima kun la plej fama

la maro antaŭ la sanktejo. Sur la insulo ni vizitis la pinton de la monto Misen (530m), kelkaj per telfero, sed iuj piede - kio estis la lasta preparo por la suprengrimpado al la pinto de la monto Fuĵi. Supre atendis nin bedaŭrinde ne tre bela videblo pro nebulo, sed, eble kiel rekompenco por la nerigardeblo, ni renkontis tie simiojn, kiuj vivis libere en naturo, tamen neniel lasis sin ĝeni de turistoj.

Sed mi saltu nun al la plej forta travivaĵo, kiun mi mem en miaj rememoroj portis reen hejmen el Japanio kaj kiu verŝajne neniam povos esti superigita: la suprengrimpado al la pinto de la sankta monto Fuĵi.



Torio (Ŝinto-pordego) troviĝanta en

Ĉiam supren

Kiam mi proponis tiun travivaĵon al la karavananoj, mi esperis, ke mi trovos almenaŭ kelkajn kuraĝulojn, ke mi kun mia amikino Marie ne supreniru solaj. Kaj vere, kreiĝis internacia ĉeĥa-germana 12 persona grupo. Ni ĉiuj decidiĝis oferi dum unu nokto komfortan dormon en hotela lito kaj anstataŭ tio ataki sen unu minuto de dormeblo la plej altan punkton de Japanio (3776m). Nia aventuro komenciĝis vespere post la kongresa fermo, do sabate, je la 6-a, kiam ni ekveturis trajne al Ŝinĵuku, administracia centro de Tokio kun multaj ĉielskrapantoj. Ne por admiri la buntecon de amasigitaj neonaj reklamoj, sed por trovi la rezervitajn lokojn en la aŭtobuso, kiu veturigis nin sekve al la 5-a stacio de Kawaguĉikoguĉi en la alton 2305 metroj super la maro. Do restis ankoraŭ la altodiferenco 1472m (por komparo: pli ol duoblo de la altodistanco inter Pec pod Sněžkou kaj la pinto de Sněžka en pli maldensa aero, kun kiu ni ne havis spertojn), por kio ni havis je dispono unu nokton.

Post proksimume unuhora aklimatigo kaj preparo ni startis, unue esperante, ke ni iros ĉiuj komune. Sed ho ve! Estis miloj de tiaj kaj pliaj kaj pliaj aŭtobusoj eligis pliajn kaj pliajn turistojn, kiuj same kiel ni

revis pri tio vidi de la pinto de Fuĵi la sunleviĝon! Do, en la vera homamaso ni grimpis en mallarĝa pado suprendekliven. Nur survoje mi ekkomprenis, ke ne estis saĝe difini por la supreniro ĝuste la nokton de sabato al dimanĉo, kiam ankaŭ japanoj ne laboras kaj do la amaso de grimpantoj estas kelkobla ol dum la ceteraj noktoj de la semajno. Tio estu averto por tiuj, kiuj volos entrepreni iam la samon.

Mi devas konfesi, ke neniu el ni sukcesis atingi la pinton antaŭ la sunleviĝo, bedaŭrinde. Tamen, ni grimpis el la orienta flanko de la monto, do ne nur ni, kiuj jam estis preskaŭ supre, sed ankaŭ tiuj, kiuj decidiĝis duonvoje reveni, povis la sunleviĝon ne nur vidi (tio estus vere malkonvena vorto!), sed travivi kaj percepti ĝin per ĉiuj niaj sensoj - almenaŭ mi sentis tiel!



Ek al la pinto de Fuĵi

La veran pinton ni atingis nur je la



7-a horo - precipe pro la homamaso, pro kiu ni devis antaŭ ĉiuj pli komplikaj partoj longe vici antaŭ ol povi daŭrigi. Pro tio restis maltra tempo por sufiĉe profunda esplorado kaj ĝuado de la impresoj en la pinto mem. Tamen, la rigardo en la krateron, la ĉirkaŭrigardo al la pintoj de malpli altaj montoj elirantaj supren el nuboj sub ni, la observo detempe-altempa prezentiĝo de almenaŭ unu el la famaj 5 Fuĵi-lagoj kaj precipe, pro la ĉiama movo de nuboj, sekvo de la ĉiumomente ŝanĝiĝanta scenejo!

Onidire la videblo el la pinto de Fuĵi estas nur dum duonhoro ĝis maksimume unu horo post la sunleviĝo. Ni tamen estis eksterordinare bonŝancaj, ĉar ni povis vidi alterne diversajn partojn de la tero la tutan vojon dum nia mal-supreniĝo!

Ni revenis posttagmeze en la hotelon lacaj, malpuregaj de la lafa

polvo, kiu kirliĝis sub niaj piedoj, kelkaj kun (feliĉe malgravaj) vundetoj, sed certe ĉiuj feliĉaj pro la neforgesebla travivaĵo kaj nova sperto. Mi ĵuras, ke neniu el la kunpilgrimantoj bedaŭras, ke li aŭ ŝi tiunokte ŝanĝis la komfortan liton por la laciga turismado.

Petro Chrdle



Kratero de Fuĵi



Sur la pinto



*Granda Budho
en Kamakura*

Kontribuo al la movada historio

La historio de nia movado jam kelkfoje allogis studentojn de filozofia fako por pristudo kaj ĝia prilaboro. Ĉijare tio okazis en Filozofia-naturscienca Fakultato de Silezia Universitato en Opava, kies studentino Eliška Votýpková ellaboris kaj la 18-an de semtembro 2007 sukcesis pridefendi la bakalaŭran diplomlaboron "Esperanto en Opava 1945-1965", kompreneble en la ĉeĥa lingvo. La studentino ne scias la lingvon, sed ŝia avo František Nestřeba partoprenis la movadon en la urbo Třebíč. La temo estis elektita iniciate de la subskribinto, kiu ankaŭ al studentino disponigis materialon el propra riĉa arkivo kaj helpis per siaj konsiloj, rememoroj kaj tradukoj de Esperanta materialo. Ŝi ankaŭ intervjuis kelkajn "malnovajn" esperantistojn. La laboraĵo havas 55 tekstajn paĝojn kaj tridek almetaĵojn. La enkondukaj ĉapitroj klarigas ideojn de Zamenhof kaj koncize ankaŭ organizo de la movado en Ĉeĥoslovakio ĝis la jaro 1969. Poste estas traktata la movado en Opava ne nur en la urbo mem, sed ankaŭ en iama distrikto. Temas pri Esperanto kluboj aŭ rondetoj en Háj ve Slezsku, en Branka u Opavy, en Vítkov. Ekzistis ne tre longe klubo ankaŭ en Budišov nad Budišovkou, sed pri ĝi ne estis trovitaj konkretaj materialoj. Specialan atenton dediĉis la autorino al tempo, kiam junularo el Opava staris frunte de la junulara E-movado en nia lando en kvindekaj jaroj. Ŝi prezentis diversajn junularajn informilojn kaj gazetojn kaj diversajn gravajn aŭ nur amuzajn renkontiĝojn. En lastaj ĉapitroj estas

diskutata poŝare laboro kaj aktivado de Esperanto rondeto de UK Ostroj ekde ĝia fondiĝo en 1960. En la tasko frekventiĝas multaj nomoj de nun jam nekonataj esperantistoj sed pli ofte tiuj, kiuj aktivas en la movado ankaŭ nuntempe. La diploma laboro servos kiel bazo por iam plenumota historio de la movado en Opava kaj la ĉeĥa parto de Silezio, por kiu mi jam kolektas materialon.

La 15-an de oktobro organizis Maticeslezská kune kun Silezia Universitato la historian konferencon, dediĉitan al historio de Opava. Ĝi estas jam la sesa en la vico, kiu komenciĝis en la jaro 1997 kaj la konferencoj ripetigas ĉiun duan jaron. Inter pli ol deko da fakaj referaĵoj estis ankaŭ parolado de E. Votýpková pri la rolo de esperantistoj el Opava en tutŝtata E-movado. Venontjare eldonos Maticeslezská kunlabore kun la Landa arkivejo en Opava prelegaron, en kiu estos publikigita krom ceteraj ankaŭ la prelego de E. Votýpková.

V. Kočvara

Edukado ĉe interreto

La junulara organizo "Edukado ĉe Interreto", [E@I](#) meze de septembro estis akceptita de Eŭropa Junulara Fondaĵo (EYF) kiel internacia junulara organizo aganta Eŭrop-skale. Per tiu paŝo la iama faka sekcio de TEJO ekhavis similan juran staton kiel la patrina organizaĵo, kaj tiu membreco ebligas al [E@I](#) memstare peti financajn subvenciojn ĉe diversaj forumoj. La organizo "Edukado ĉe Interreto" realigis jam plurajn projektojn, kaj pretigis retejojn kiel [lingvo.info](#), [interkulturo.net](#), [lernu.net](#), [nitobe.info](#) kaj [komputeko.net](#). *Ret-Info*

Esperanto en Olomouc

La 19-an de majo 2007 aranĝis Esperanto-sekcio de VSMO (Patrujsciencia Societo muzea en Olomouc) kaj Esperanto-klubo Olomouc renkontiĝon okaze de 75-jara datreveno de instalado de memorŝtono honore al L. L. Zamenhof kaj plantado de ekzotika arbo Liriodendron tulipifera, alportita de argentina esperantisto kiel donaco al la 5-a kongreso de ĉeĥaj esperantistoj en Olomouc en la jaro 1932. Dum la solenaĵo en la parko de B. Smetana estis ankaŭ nomita proksima strato „Strato de L. L. Zamenhof“, nuntempe nomata „Zamenhofova“. La festparoladon prezentis prezidanto de Patrujsciencia Muzea Societo PhDr Milan Tichák, la programon pliriĉigis muzika prezentado de violonisto Jan Duda kaj de lia frato, gitaristo František Duda. La poemon „La vojo“ de Zamenhof recitis Jan Duda kaj ing. Michal Balík. La feston partoprenis reprezentantoj kaj gastoj de diversaj rondetoj, entute ĉirkaŭ 35 personoj. Post la programo renkontiĝis la partoprenantoj en proksima restoracio, por refreŝiĝi kaj pasi agrablan horeton en amika kunesto.

La 19-an de junio 2007 mi estis invitita de la regiona radio-elsendo de Ĉeĥa radio Olomouc por parto-

preni en la Programo Větrník. Dum unuhora renkontiĝo, kiun gvidis redaktorino Zora Ježková, ni parolis pri la 120-a datreveno de eldono de la unua lernolibro de Esperanto kaj de la 90-a datreveno de la morto de nia Majstro. Ni parolis pri ekesto kaj principo de Esperanto, pri vivo kaj verko de Zamenhof, pri literaturo en Esperanto, kongresoj, kluboj, pri Verda stacio Brno, Moraviaj Esperanto-Pioniroj ktp. La parolado, konvene interrompata per muziko, donis bonan eĥon ĉe aŭskultantoj.

La 2-an de aŭgusto vizitis nian urbon la grupo de 19 esperantistoj de la pola urbo Bialystok. La renkontiĝon organizis s-ano Láni, al kiu helpis kelkaj membroj de la klubo kaj sekcio. Post la sankta meso en la baziliko de la Sankta monteto kaj komuna tagmanĝo ni forveturis al Olomouc, kie ni konatigis niajn gastojn kun la memorŝtono kaj arbo kaj la strato de Zamenhof. Poste sekvis trarigardo de monumentoj de la urbo inkluzive de mallonga koncerto por violono kaj orgeno en unu belega preĝejo. Niaj gastoj esti forveturantaj kun bonaj kaj belaj impresoj, kiujn donis al ili bela suna tago kaj promenado en nia historia urbo.

La reta paĝaro de la klubo estas nove prilaborita.

Jan Duda

Invito al la III-a Sabla Printempo

4.-6.4.2008 en Písek

Ĉi-foje omaĝe al **centjariĝo** de Esperanto-klubo en Písek! Krom kulturaj prelegoj kun projekciado, koncerto kaj urbotrarigardo sabate posttagmeze kaj dimanĉe antaŭtagmeze okazos paralele

* seminario „Esperanto en la Reto“ – ĉi-foje kun la ĉeftemo „Kiel utiligi interretan enciklopedion Vikipedio kaj kiel fariĝi la kontribuanto“ (praktika kurso por komencantoj)

* ĉiĉeronado tra interesaĵoj de Písek kaj/aŭ paroliga lingvokurso (sabate) kaj ekskurso al burgo de Strakonice, kie ekde septembro 2007 haveblas ĉiĉerona teksto en Esperanto (dimanĉe antaŭtagmeze)

Tranoktado en la hotelo BULY apud la Urba Insulo, ekde 280,-Kč popersone kaj ponokte en 3-lita ĉambro kun propra duŝo/necesejo (loĝado en 1-kaj 2litaj ĉambroj eblas). Nedevisa mendo de manĝoj.

Pli detala programo kaj informoj por vi preparatas. Petu ilin ĉe:

esperanto.pisek@seznam.cz


aŭ ĉe: PhDr. Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek.

E-klubo La Ponto antaŭĝojas atendante vian abundan partoprenon!



Novaĵoj el Mladá Boleslav

Esperanto-klubo Mnichovo Hradiště + Mladá Boleslav preparis novan version de sia retejo, en kiu aperos ĉeflingvaj kaj esperantlingvaj artikoloj pri la movado.



La klubo eldonis ankaŭ la kvaran volumon de sia legolibro (Legolibreto IV) kaj ĉeĥan tradukon de la biografio de Zamenhof el la plumo de René Centassi kaj Henri Masson Ĉlověk proti Babylonu. La libron enĉeĥigis kaj proprakoste eldonis Jindřiška Drahotová.



Radio-elsendoj

Kvankam ĉesis elsendi la kurtondaj Radio Vatikano kaj Itala Radio, almenaŭ Vatikano elsendas podkaste (rete) dum du tagoj semajne. Tamen la kontakto estas limigita nur al posedantoj de komputilo kun interreta eblo. Ĉar plimulto da esperantistoj estas aĝuloj, ili povas peti amikojn aŭ konektiĝi en internetaj kafejoj aŭ en ĉiuj publikaj librejoj. Ni ne paciĝu kun la sento, ke ni faris nenion kontraŭ formorto de nia movado. Disvastigu la novan komunika-

Josef Hradil

e-mail: mudrhradil.@seznam.cz

(vidu radio-podkastojn en Starto 2/2007, p. 45)

LINGVA ANGULO

Dividado de vortoj en Esperanto

Ĉar en ĉiu lingvo eskzistas aliaj reguloj por dividado de vortoj fine de linioj kaj ĉar Zamenhof rigardis la aferon malgrava, „papera“, ne estas eraro, se oni dividos vorton kie ajn. Tamen estas **konsilinde** respekti certajn rekomendojn: kunmetitajn vortojn dividi laŭ vortelementoj (prefiksoj, radikoj, sufiksoj), ekz. *en-poŝ-igi*, sed ne memstarigi finaĵon (ne: *enpoŝig-i*). Longajn radikvortojn dividi laŭ silaboj, kiel oni prononcas ilin: *dro-me-da-ro*, *eks-pe-ri-men-to*. Kelkaj personoj preferas ankaŭ kunmetaĵojn dividi laŭ la prononcataj silaboj: *en-po-ŝi-gi*. Plie necesas atenti signifojn de vortoj, por ne erarigi la legantojn: *eks-per-ti* (esti eksperto), *ek-sper-ti* (komenci sperti, akiri sperton).

-mm-

Junulara Kongreso

En 2008 – de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto - IJK, jam la 64-a, okazos en la romia hungara urbo Szombathely, je kelkaj km de la aŭstria landlimo. La aranĝo kunligos la tradicion de la IJK – ekz. gravaj debatoj en pleno kaj diskutrondoj (ĉefe pri la ĉefa temo de IJK: minoritataj rajtoj) - kune kun la kutima juneca etoso, en kiu brilos sportoj, akvobatalo, dancoj, ekskursoj, naĝado ktp. Ĉio tio en la esperantista klimato de internacia amikeco sen lingvaj problemoj.

Carevo

01-10. 07. 2008

Bulgara Esperanto-Asocio invitas al internacia renkonto apud Nigra Maro kun interkona vespero, trarigardo de Carevo, ekskursoj al Stranga vilaĝo kaj Sozopol, pikniko ĉe vilaĝo Sinemorec, vizito de botanika ĝardeno, konversacioj, amuzoj. Aliĝu ĝis fino de februaro Adreso : inĵ . Boris Vasilev Gaĝanov, str. “Petar Janev“ 21, 4600 Velingrad, Bulgario, tel: 0035935954204; mob: 00359898676270 e – mail : gadzanov_b@abv.bg.

Grava atingo ĉe Google

La populara reta serĉilo jam longe havas esperantlingvan version. Sed nun estis Esperanto alvicigita al 43 lingvoj, kies retejoj estos priserĉataj prioritare, se vi serĉos de la adreso kun aldonita lingvo: **http://www.google.com/webhp?hl=eo&lr=lang_eo**. Google nun kapablas serĉi ene de pli ol 2.680.000 esperantlingvaj paĝoj. *laŭ Marek Blahuš*

HONORAJ MEMBROJ DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

jen la nova rubriko, kies tasko estas prezenti al la legantoj de Starto la honorajn membrojn de ĈEA. Sciigi al vi, kiel ili vivas, kiajn ili havas opiniojn, sed ankaŭ iom resumi, kion ili faris por Esperanto kaj kial do ili fariĝis niaj honoraj membroj. Ĉion ĉi mi planas realigi laŭeble en la formo de intervjuoj. La elekto estas pli malpli hazarda, tamen ne tute. Kiel unuajn mi decidiĝis intervjui du el ili, kies verkoj aperis antaŭ nelonge, nome niajn samideanojn Karel Kraft kaj Jiří Laube.

Karel Kraft, Mgr. (*1926)



apartenas al niaj plej multflanke aktivaj esperantistoj: aŭtoro de la *Ĉeĥa-Esperanta Vortaro* kaj kunaŭtoro de la *Esperanta-ĉeĥa vortaro* (plej ampleksaj vortaroj de Esperanto por ĉeĥoj), tradukanto el Esperanto ĉeĥen (*Baza instruo de Vonbulismo*) kaj aŭtoro de la interesege vivopriskribo de la ĉeĥa edukisto Přemysl Pitter *Heroo de amo* (ĉiuj ĉi eldonaĵoj de KAVA-PECH), sed ankaŭ de la memeldonita rakonto pri siaj hundoj *Tri amikoj* - kaj okaze de la UK en Pekino estis eldonita lia poemo *Kia terbatado* en la kolekto titolita „Poemaro por paco“.

Vi estas profesie instruisto de matematiko, tamen vi laboris ĝis 1989 kiel konstrulaboristo. Pro kio vi devis forlasi vian instruistan postenon?

Kiel aktiva militkontraŭlo, membro de War Resisters International, fondanto de distrikta Společnost pro lidská práva en 1968 ktp. mi apartenis al tiuj, kiujn la reĝimo ordonis post invado de sovetaj militfortoj puni per senigo de plujaj homaj rajtoj.

En via verko pri „Heroo de amo“ vi pruvis detalan konon de la vivo kaj agado de Přemysl Pitter. Ĉu vi povas diri al ni kelkajn impresojn el viaj personaj rilatoj?

Mi ege admiris la edukan arton de Pitter en lia Milič-domo. Duaflanke Pitter, gvianta militkontraŭlo en la periodo inter la unua kaj dua mondmilitoj, interesiĝis pri mia rifuzado subiĝi al militekzercado. Mi komencis dujaran pormilitan servon per envicigo en artilerian lernejon por oficiroj. La komandanto de la lernejo plenumis mian peton kaj resendis min al la regimento. Pro manko de intereso oni elĵetis min el la lernejo por suboficiroj. La ekzamenon por la kurso de mezuristoj mi pro eraroj en kalkulado ne plenumis. Dum mi kuŝis malsana en milita tuberkuloza malsanulejo kiel rezulto de malsatstrikto, oni nuligis miajn tri akuzojn ĉe la milita prokurejo (pro neobeo al ordono en batalekzerco ktp). Nur kurte mi kontaktis kun Pitter, mi ekkonis lin en la jaro 1951 kaj en la sama jaro en aŭgusto mi vidis lin lastfoje dum nia komuna restado en lia somera infansanigejo en Mýto. Fine de tiu monato li savis sin per fuĝo el Ĉeĥoslovakio kaj mi jam neniam renkontis lin, li neniam revenis en sian patrujon, nur skribe ni kontaktis dum lia restado en Svisujo ĝis lia morto en 1976.

Ĉu estas ankoraŭ alia Esperanto-rilato, kiun vi volonte menciis?

Plej korproksime daŭras mia dejunaĝa kontakto kun blinda redaktoro de porblindula

gazeto La Kontakto Jacob Wieringa kaj lia edzino, kvankam li nur unufoje vizitis min kaj mi nur en la jaro 1968 sukcesis transpaŝi landlimon kaj viziti lin en Nederlando. Mi korespondas kun li brajle kaj nun li legas miajn tekstojn prefere per legosintezilo, ĉar tiel li povas pli facile transpreni miajn kontribuaĵojn por la gazeto.

Ĉu vi volas mesaĝi ion al nova generacio de esperantistoj?

Fidon, firman konvinkon, ke via laboro por la lingva interkompreno pravos kaj ke ĝi estas ege utila.

Jiří Laube (*1923)



apartenas al tiuj esperantistoj, kiuj ne nur ne ricevis ŝancon profunde studi (krom se li dum la germana okupacio akceptus universitatan studadon en Germanujo), sed eĉ li estis 6 jarojn arestita „pro krimoj kontraŭ la komunisma reĝimo“. Tamen li neniam interrompis la daŭran dediĉon al kaj laboron por siaj idealoj, al kiuj apartenas unuavice Esperanto kaj studado de kulturaj radikoj de nia Eŭropa civilizacio. Dum la interparolo kun li oni devas admiri lian nerompitan optimismon kaj pluan studemon kaj laboremon eĉ en siaj 85 jaroj.

Vi konas plurajn lingvojn (la latinan, germanan, francan, anglan, hispanan kaj Esperanton), kaj vi lernis ankaŭ la grekan lingvon. Vi, komence oficisto, poste fabrika laboristo, arestito pro „krimoj kontraŭ la komunisma reĝimo“, helplaboristo. Fidela al Esperanto kiel instruanto, fondinto de E-kluboj kaj funkciulo de ĈEA. De vi organizita terminologia kurso en Roudnice en 1986 havis grandan eĥon ankaŭ eksterlande. Certe mi ion forgesis, ĉu vi mem povas diri ion al la legantoj de Starto pri vi mem?

Verdire mi ne scias, kion mi diru ankoraŭ. La du totalismaj reĝimoj esence misformis miajn studplanojn. Kutime oni dum intervjuoj vicigas, kion kiu studis, kion publikis, eventuale kian elstaran postenon li atingis. Nenion el tio mi povas diri pri mi. Mi ne volas kulpigi la negativajn influojn de la tempo, kvankam ili estis ankaŭ tiaj.

Do, vi ne havas diplomojn el universitatoj, tamen mi jam skribis pri vi enkonduke, ke vi parolas plurajn lingvojn, kio certe ne estis normala en la tempo, dum kiu vi vivis vian mezan aĝon. Kie estas komenco de tio rilate vin? Kaj kiel vi povas koncize resumi vian agadon?

Mi studis ekde 1934 ĝis 1939 en la ĉefepiskopa gimnazio en Bubeneč, kiun baldaŭ okupis la nazioj. Pro necerteco en la komenciĝanta milito mi transiris en la gimnazion en Terezín. Dume en Bubeneč mi lernis la grekan, en Terezín mi devis studi la francan, kio ne kaŭzis al mi problemon, ĉar mi lernis ĝin jam antaŭe private. Mi aliĝis al la somera (1940) kurso de la angla, sed ĝi estis lastmomente malpermesita kaj anstataŭigita per la germana (universitata ekzameno), sekvontjare la angla jam estis permesita, mi lernis ankaŭ ĝin. Post fermo de la gimnazio en Terezín (kaj evakuo de la tuta urbo Terezín) mi pasis la lastajn du jarojn en Louny. Ĉar mi finis la maturec-

ekzamenon kun tre bona rezulto en la germana, oni proponis al mi stipendion por plustudi en Germanio, kion mi ne akceptis. Menciindas, ke mi pasis la maturec-ekzamenon la 6-an de junio 1942, du tagojn post la morto de Heydrich kaj 4 tagojn antaŭ la neniigo de Lidice, do en tre turbulenta tempo.

Mi laboris kiel oficisto ankaŭ post la milito. En 1954 mi estis arestita kaj kondamnita (ankaŭ mia edzino) kaj post la amnestio en 1960 mi laboris kiel help-laboristo ĝis mia pensiigo en 1983.

Apud mia manlaboro mi aktivis por Esperanto instruante en la somera tendaro en Lančov, kun mallongaj interrompoj mi konstante laboris por Esperanto en la Scienca-teĥnika sekcio de ĈEA, en la loka grupo Roudnice, organizis jam menciitan internacian terminologian kurson en Roudnice, ktp.

Mi kompletigu la informon, ke vi agas ankaŭ ekster Esperantujo en Demokratia Klubo. Kio igis vin ekagi en ĝi?


Per invito de la prezidanto de la Klubo. Li konis min el la tempo de sia esperantista aktivado. La ideo de harmonia kunvivado de ĉiuj estas propra por ambaŭ organizaĵoj. Demokratia Klubo fondita en 1948 okupiĝas pri demokratismo, t.e. idealo de demokratio, kiu eble neniam estos realigita en pura formo, sed ĉiam ĝi restas nia dezirinda celo. Esperanto estas enkorpiĝo de lingva demokratio kaj paca kunekzistado.

Parte ĝi identas ankaŭ kun aktivado de la serio de internaciaj konferencoj Forum 2000, iniciatita de la eksa ĉeĥa prezidento Václav Havel kaj la israela verkisto Ellie Wiesel.


Evidentas, ke ĉiuj tiuj aktivecoj klopodas senprofite instali homdignan socion esprimitan per la komuna slogano „libereco kun respondeco“.

Mi kompletigu la informon, ke ĵus aperis la verko de Jiří Laube konciza laŭ la amplekso, sed grava laŭ la temo kaj enmetitaj ideoj „Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo? Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj“, KAVA-PECH, A5, 31 p., aparte kaj en Esperanto, kaj en la ĉeĥa. Kiu do volas ekscii pri la ideoj de Jiří Laube pli, jen la bona ŝanco.

Intervjuis: Petro Chrdle



La nova verko de Jiří Laube pensigas pri integriĝo de kulturoj (helena-latina - judisma - kristana - islama), pri la reveno al la komunaj radikoj ĉe Abrahamo, kiuj povas helpi al reciproka kompreno de la civilizaciaj diferencoj kaj kompreneble finas per konvinko, ke la integriĝo de Eŭropo ne povas eviti komunan neŭtralan lingvon.



La 19-a Internacia Kultura Festivalo en Ústí nad Labem

La tradicia Esperanta Kulturfestivalo okazis dum la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 2007 en urbo Ústí nad Labem, Nordbohemio (Ĉeĥa respubliko). Ĉi-jare ĝin partoprenis plejparte Ĉeĥoj, sed ĉeestis ankaŭ germanaj esperantistoj (en la pasintaj IKF-oj ne mankis ankaŭ slovakoj, francoj k.a.).

La vendreda programo apartenis al interkona vespero de la ĉeestantoj, venintaj el diversaj lokoj de Bohemio, Moravio kaj Federacia respubliko Germa-



nio.

La ĉefa tago de la festivalo estis sabato, la 2-an de decembro. En la trihora prelega matineo oni aŭskultis 7 prelegojn akompanatajn de vigla diskuto. Inter aliaj programeroj de la matineo mi menciis ĉeeston de ĉeĥa poetino Marie Dolistová, kies poemoj estis prezentitaj paralele kun la Esperanta traduko. Ŝi emocioplene esprimis sian miron pri la surprize alta tradukeblo de siaj poemoj en Esperanton, pri la belsonco de

Esperanto kaj tute libera parolfluo de la ĉeestantoj dum la diskutoj.

Sabate posttagmeze okazis spirita koncerto en la preĝejo de Sankta Paŭlo, kiu enhavis klasikajn muziknumerojn de mondaj komponistoj prezentitaj en Esperanto fare de profesiaj artistoj. La programo estis finita per komuna kantado de Beethoven-a odo "Al la ĝojo" (An die Freude), el lia 9-a simfonio.

Vespere, en impona salono de la urba artlernejo, okazis koncerto de mondkonataj melodioj prezentitaj de profesiaj kantistoj kaj muzikistoj (el la listo de prezentitaj muzikaj numeroj mi elektas:

W. A. Mozart: 1-a parto de sonato C maĵora (fortepiano); Zdeněk Fibich: Idilio; K. M. von Weber: virtuoza klarnetnumero; G. Donizetti: ario el la opero Don Pasquale; F. Lehár: ario el la opereto „La lando de ridetoj“; J. Strauss: ario el la opereto Ciganbarono k.a.

En la artprogramo rolis Miroslav Smyčka, Kateřina Kudlíková, Josef Vích, Jan Duda, Václav Urban, Tereza Urbanová, Václav Vanc kun siaj filoj kaj Bohuslava

Převrátlová (Šrutová) kun siaj infanoj.

Post la oficiala artprogramo la publiko komune kantis, kun pianakompano, kelkajn kristnaskajn kantojn tradukitajn en Esperanto. Fino de la vespero estis dediĉita al tombolo.

La tripartan sabatan programon partoprenis preskaŭ 50 esperantistoj.

Dimanĉe estis organizitaj du programoj. Unu grupo de interesatoj ekskursis al nemalproksima observa turo, de kie

estas impona disrigardo al České středohoří (Mezbohemia montaro), al Krušné hory (K. montaro) kaj al urbo Ústí nad Labem mem, ĉirkaŭata de romantikaj montetoj kaj trafluta de la plej granda rivero de Ĉeĥio, Labe (Elbo).

La dua grupo de ĉeestantoj kunvenis en salono, kie ili aŭskultis preskaŭ unu-horan magnetofonan programon pri Jan Amos Komenský – Komenio, lia biografio kaj ĉefaj, mirinde multaj, verkoj. Oni ankaŭ aŭdis liajn profetajn vortojn koncerne utilon kaj neceson de internacia kompreniĝo surbaze de unu komuna lingvo. Lia koncepto, esprimita antaŭ pli ol tricent jaroj, respondas ĝenerale al la ideoj de Esperanto.

La nivelo de la 19-a IKF estis tre alte aprezita de la ĉeestantoj, kiuj esprimis deziron, ke post unu jaro oni okazigu jubilean 20-an IKF.

Vlastimil Novobilský
prezidanto de Klubo de esperantistoj en
Ústí nad Labem



fotoj de Josef Kříž

„ipernity” en Esperanto

„ipernity” estas la unua servo, kiu ebligas al vi kunhavigi ĉion en Interreto: blogo + fotoj + filmoj + sonaĵoj + ĉiaj specoj de ciferecaj dokumentoj estas nun kunigitaj en unu sola spaco kaj publikigitaj laŭvole.

„ipernity”, kiu estis lanĉita antaŭ 5 monatoj en la lingvoj angla kaj franca, jam ekde la komenco estis forte ŝatata de pluraj Esperanto-parolantoj, el kiuj kelkaj spontanee volontulis por traduki „ipernity” en la lingvon de D-ro Zamenhof.

„La forta ligo, kiu kunigas niajn membrojn kun „ipernity”, ebligis al ni alfronti la problemon de plurlingvigo en komuna kaj volontula maniero, kie la membroj mem kunlaboris en la tradukado, uzante eksterretan tradukilon. Ni tiel akiris tre rapide tradukojn de la retejo, kiuj korespondas perfekte al la bezonoj de la uzantoj.” - deklaras Christian Conti, kunfondinto de la servo.

Danke al tiu ĉi metodo „ipernity” estas ekde nun havebla en 6 lingvoj, inter kiuj la germana, la hispana kaj la itala! Pro ĉia rapide kreskanta sukceso, la asocio jam komencis novajn tradukojn por povi malfermiĉi al pli granda nombro kaj al pli da diverseco, kaj por la feliĉo de siaj membroj. Vidu:

<http://www.ipernity.com>

- „ipernity” adresas sin ne nur al familioj kaj amikaj grupoj por privata uzo, sed ankaŭ al kreantoj por la disvastigo de siaj verkoj al pli granda publiko.

laŭ Ret-Info

Tulipoj Esperanto

Nederlanda firmao Bakker pri tulipoj en sia aŭtuna katalogo 2007 ofertas tulipojn Esperanto (*Tulipa viridiflora Esperanto*), la ĉeĥa filio en Pardubice sub la kataloga numero 0830-08 kontraŭ 239 Kč por 12 pecoj. La filioj ekzistas ankaŭ en aliaj landoj, sekve oni povas trovi la saman retejon pri la tulipo en diversaj eŭropaj lingvoj (la ĉeĥa sub adreso: <http://www.bakker-cz.com/index.aspx>).

P. Sittauer

Foglar kaj Esperanto

Ĉijare aperis en la eldonejo *Knižní klub* (Libroklubo) verko de Miloš Zápletal *Záhady a tajemství Jaroslava Foglara* (Misteroj kaj sekretoj de Jaroslav Foglar), fakte biografio de la plej populara ĉeĥa verkisto por knaboj. La aŭtoro miras, ke Foglar estis tradukita nur en la lingvojn polan, hungaran kaj germanan kaj veran raraĵon li vidas en traduko al Esperanto aperinta en Třebíč (p. 146).

P. Sittauer

Spegulo

En la alproksimiĝanta nova jaro 2008 en Pollando komencos aperadi nova revuo titolita **SPEGULO**. Ĝi estos kvaronjara revuo kun socikultura enhavo, turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. En estos en ĝi originalaj poemoj, rakontoj kaj teatraĵoj, kaj ankaŭ tradukoj el la plej diversaj lingvoj. Redaktos T. Chmielik, K. Leja, L. Ligeza kaj S. Smigielski.

Esperanto en televido kaj radio

Jaroslav Suchánek parolis en televida programo *Sabotáž*, Marek Blahuš aperis en *Křesťanský magazín* (pri nova junulara retejo *Signály*), en kiu li menciis Esperanton, al Esperanto estis dediĉita porinfana radioprogramo *Domino* kun Dan Mrázek, Martin Minich kaj M. Blahuš. En programo de internaciaj riportistoj oni elsendis riporton el Roma Esperanto-klubo. Kelkaj el la menciitaj programoj estas elŝuteblaj en la interreto.

Novajoj en Esperanto-urbo

Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, jam havas pli ol 40 Esperanto-ŝildojn, kiujn financis multaj sponsoroj, ekz. ĉe la urba biblioteko, ĉe la 7-kilometra promenejo, ĉe memorejo Joachim Gießner, plie estis esperantigitaj manĝokartoj en tri restoracioj.

Supera kurso de Esperanto

komenciĝis ĉe Jagelona Universitato en Krakovo, nome 2-semestra, 90-hora. La partopreno povas esti aŭ ĉeesta aŭ koresponda (rete) kun 3-taga studrestado en Krakovo. Instruas Maria Mejrčzak, la finstudintoj ricevos atestilon. La ĉefaj celoj de la kurso estas gramatika precizeco, riĉeco de la vortprovizo, sinesprimado en bela kaj facilflua Esperanto, uzado de diversaj stiloj, redakto-kapablo, enkonduko al ĵurnalista redaktado, arto argumenti, diskuti kaj gvidi diskutojn, arto voĉe prezenti tekston (i.a. literaturan).

Mortis Vladimír Klazar

Lunde la 19-an de novembro adiaŭis Silezia teatro en Opava kaj vasta publiko kun Vladimír Klazar, estinta aktoro, reĝisoro kaj ĉefo de dramtrupo de la teatro. Li subite mortis 9. 11. en aĝo de 87 jaroj. Li mem ne estis esperantisto, tamen li enskribiĝis en la ĉeĥa movada historio. Influita de amikaj rilatoj kun la subskribinto li kun sia edzino A. Španihelová,opersolistino, kaj pluaj mebroj de la teatro en Opava plenumis en Esperanto artan programon de la 1-a Esperantista Kultura festivalo en Opava en 1967 omaĝe al la 100-jariĝo de la poeto Petr Bezruč, kulturdatreveno de Unesko. Post inspiriga sukceso li akceptis proponon surscenigi iun ĉeĥan dramverkon en Esperanto. Post pristudo de tiamaj ebloj mi proponis elekti verkon de V. Nezval Manon Lescaut, kiu estas tre ŝatata de ĉeĥa popolo kaj plue tiam ekzistis eminenta traduko de la verko pere de Jiří Kořínek, ĝi estas samnivela kiel la ĉeĥa originalo. Komence de la jaro 1968 kreiĝis necesa trupeto, kiu unue plenumis bazan Esperanto-rapidkurson, por ke la aktoroj bone komprenu la lingvaĵon de la teatraĵo kaj oni komencis studi unuopajn rolojn. Vladimír Klazar reĝisoris la spektaklon, mi prizorgis la lingvan kvaliton. Post kelkaj monatoj estis la surscenigo preta kaj en Opava – tiama Teatro de Z. Nejedlý – okazis la premiero, kiun partoprenis esperantistoj el Ostrava-regiono. La rezulto estis eminenta. Sekve la grupo aliĝis al la Internacia Festivalo de Esperanto-teatroj en Pulo (Jugoslavio), kien forveturis la grupo aŭtobuse kune kun necesa teknika ekipaĵo, kostumoj kaj ĉiuj bezonaĵoj. Tio

estis la unua elveturo de Opava teatro eksterlanden post la dua mondmilito. La karavano ricevis gravan financon subtenon de tiama Regiona Nacia Komitato, kontribuis ankaŭ la urbo Opava. Ĉar aktora trupo krom la surscenigo preparis ankaŭ Artan Vesperon kun deklamado kaj operarioj, ĝi vizitis unue Zagrebon, kie estis prezentita tiu programo (organizis tion Kultura Servo), kaj poste okazis jam ĝuste en Pulo en "Istrisko Narodne kazalište" (Istria Nacia Teatro) la eksterlanda premiero de la verko. Alitage ripetiĝis ankaŭ la Arta Vespero. Ambaŭ vesperoj estis sukcesaj.

Post reveno hejmen havis la kolektivo pluajn interesajn planojn por prezento de jam preparita surscenigo kaj ankaŭ intencis prepari pluan verkon por scenejo. Bedaŭrinde kelkaj tagoj post reveno invadis en Ĉeĥoslovakion soveta kaj aliancanaj armeoj kaj la situacio draste ŝanĝiĝis. Kvankam prezento de Manon Lescaut ankoraŭ foje okazis en Jablonec nad Nisou dum Monda Ekspozicio de Bijuterio kaj intertempe venis ankaŭ por trupo invito al UK en Helsinki, la ŝancoj tute perdiĝis. La kolektivo disfalis kaj novaj oficialaj institucioj tute malebligis tiel kolektivon elveturon eksterlanden. Tamen post la dua milito tio estis ununura kazo, kiam profesia kaj alkvalita teatro surscenigis ĉeĥan dramon Esperante.

Vladimír Klazar tamen kun kelkaj aliaj teatraj kolegoj ankoraŭ plurfoje publike prezentiĝis en Esperanto dum lokaj kaj regionaj renkontiĝoj.

Vl. Kočvara

Sukceso de ĉeĥa esperantisto

Josef Kříž el Ústí nad Labem en aprilo sendis respondojn je konkurso proklamita de la Esperanto-sekcio de China Radio International, ĉifoje je la temo „Sichuan



- hejmo de granda pando“. Oktobre li ricevis respondon, ke li akiris la unuan premion el 700 000 partoprenantoj el 142 landoj de la mondo. La premio konsistis el granda tablotuko brodita laŭ ĉinaj klasikaj motivoj. Pasintjare li estis dua kaj ricevis du kompaktnajn diskojn pri la ĉina naturo. Li esperas akiri foje unusemajnan restadon en Ĉinio. La 19-an de oktobro 2007 akceptis la venkinton hetmano de la regiono Ústí Jiří Šulc kaj direktorino de la regiona oficejo Lydie Šťastná. Pri la akcepto informas la retejo de la hetmano http://www.kr-ustecky.cz/vismo5/dokumenty2.asp?u=450018&id_org=450018&id=1409368.

Danke al la konkurso ankaŭ la

regionaj oficistoj estis informitaj pri Esperanto-movado.



Fajrovulpo nun en Esperanto

La populara, libera retnaviga programo Firefox nun ekzistas ankaŭ en Esperanto. La unua versio de la traduko estis publikigita en la lasta semajno de septembro, sed la kompletigo kaj plibonigado de la Esperanta versio daŭras. La Esperanta traduko estas distribuata kiel aldonaĵo, per kiu eblas kompletigi ajnalingvan version de Firefox.

"Mi mem instalas la tradukon, kaj nun uzas ĝin. Ĝenerale ĝi ŝajnas tre bone farita", opinias Bertilo Wennergren.

Firefox, en Esperanto ofte nomata ankaŭ "Fajrovulpo", estas tre populara, senpaga retkrozilo, la plej serioza konkuranto de Microsoft Internet Explorer. Laŭ multaj spertuloj, Firefox estas pli bona kaj pli sekura ol Internet Explorer, kaj pli bone sekvas la validajn normojn.

Legu pli ĉe:

www.liberafolio.org/2007/fajrovulpo

Laŭ Ret-Info

KALENDARO 2008

2008-02-16/25: Flugkaravano al Barato (Hindio) kaj Nepalo lige al la 5-a Asia Kongreso de Esperanto. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2008-04-04/06: Sabla Printempo en Písek, turisma, kultura kaj faka programo (daŭrigo de la seminario "Esperanto en la reto". Inf.: esperanto.pisek@seznam.cz

2008-06-29/07-12, -07-13/26, -07-27/08-09. Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, la Esperanto-aranĝo kun la plej longa tradicio en Ĉeĥio, jam kvindekaj fojoj en la sama loko! Ĉiutaga antaŭtagmeza laŭelekta instruado de lingvo (ĉiam ankaŭ Esperanto elekteblas). Inf.: podhradska@volny.cz

2008-07-18/27: Aŭtobusa karavano al la 93-a Universala kongreso de Esperanto en Roterdamo. Inf.: mirka.tomeckova@seznam.cz
Somero: EKOTUR 08, Tradicia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj.

Unusemajna, proksime de Prago, probable en la dua duono de aŭgusto en Karlštejn, dato kaj loko precizigota. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2008-10-03/05 Kongreso de ĈEA en Přešov

2008-10-06/12 InPaSem /Internacia Paroliga Semajno en Dobřichovice, chrdle@kava-pech.cz

2008-11-07/09: KAEST 2008 (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en Dobřichovice. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

Ni kondolencas

- la 6-an de aprilo 2007 mortis 73-jara **Věra Dvořáková** (EK Třebíč).

- en aĝo de 56 jaroj forpasis **Helena Benešová** (EK Třebíč)

- fine de junio mortis **Marie Kuřeová** el Liberec en la aĝo de 86 jaroj (pasintnumere estis erare skribite 66 jaroj - ni petas pardonon)

- la 23-an de septembro 2007 forpasis konata slovakaj esperantistino **Alička Komlóšiová** (nask. 1942), pedagogino.

- la 13-an de novembro 2007 forpasis

74-jara **Miroslav Srb** el Pardubice - meze de novembro 2007 en aĝo de 79 jaroj forpasis **Mgr. Věra Svobodová** (EK Třebíč)

Oprava - omluva

Ve zprávě o činnosti esperantských klubů a kroužků na svazové konferenci v Poličce mělo být správně uvedeno, že o esperantský strom před Gymnaziem Olgy Havlové v Porubě se pečlivě stará **esperantský kroužek Poruba**. Tímto se také EK Poruba omlouvám.

V.Podhradská

Rememore pri C. Kotyzová

Ĉeskotřebovský zpravodaj (Informilo de Česká Třebová) en sia oktobra numero 2007 memorigas, ke antaŭ dek jaroj forpasis handikapita esperantistino Cecilie Kotyzová, kiu organizis esperantistajn balojn kaj kursojn de Esperanto. Kvar jarojn ŝi estis magistratanino de la urbo (1990-1994).

Novajoj en STEB

Virtuala scienc-teknika E-biblioteko:

<http://www.eventoj.hu/steb/>

- Ŝuo-farado
 - Leksikono "Dr. PI bloobook"
 - Elementoj de nelineara optiko
 - La rolo de ISAE kaj Sciencia Revuo en mondo de specialigitaj sciencoj.
 - Relativeca Dopplera efiko ĉe unuforme akcelata movo.
 - La relativeca tempo
 - Birdo-kantoj kun mp3
 - Lingvo-Orientiga Instruado
 - De incenso antikva al moderna parfumo
 - Holografio kaj televido
 - Veldado en la kosmo
 - Sunsistemoj kaj planedoj ĉirkaŭ foraj steloj
 - Sismologio kaj kontraŭ-tertrema protekto en Albanio
- inf.: Szilvási László

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete V. Hiršovi seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhradíte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č. ú. 0017 011 013/0800, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 890,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4

La Gazeto: 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 540,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

Juna Amiko: 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

***Literatura Foiro**: 1000,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5

***Heroldo de Esperanto**: 1080,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

***Femina**: 660,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Litova Stelo: 300,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

Pola esperantisto: 360,- Kč, v.s. 07009, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*předplatitelé označených časopisů z ČR získají slevu 50%, pokud si zažádají o esperantské občanství - Esp. civito (t.zn. že za uvedenou částku mají časopis předplacen na dva roky)

Periodikum Českého esperantského svazu - 38. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz;

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov
117, 683 04 Drnovice, 517 385 367,
hirs@gm.vyskov.cz**

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2008

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 38-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
1.2.2008**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Nabídka starších knih zdarma

Starší esperantské knihy ze zrušené klubovny můžete získat zdarma za odvoz či poštovné. Přednost bude mít svazová knihovna, pak klubovní knihovny a jednotlivci aktivně pracující v hnutí. Seznam žádejte na adrese: Jan Werner, Dřínová 18, 612 00 Brno; e-mail: wernerjan@seznam.cz